



LA JUNA VIVO

MONATA GAZETO DE „TUTMONDA ESPERANTO-JUNULAR-ORGANIZO“

Redakcio: S-ino E. Burgler, Geleen, Markt 64, Nederlando

Giro de TEJO Nro 537168

Jarabono 3 ned. guld. aŭ egalvaloro

Kie okazos nia sekvonta IJK?

En Wörgl ni longtempe diskutis pri tio, kie okazu nia sekvontjara IJK. La Estraro de TJO post kontakto kun la nordfrancujaj geamikoj proponis, ke nia kongresurbo estu Nancy. Sed la ĉeestantaj francaj amikoj malkonsilis tion, ĉar laŭ ili la ĉirkaŭaĵo de Nancy tute ne taŭgas por fari ian ajn ekskurson. Tamen, poste ni legis en la Senaciulo, ke Nancy estas akceptata kiel kongresurbo por S.A.T. Ankaŭ Belgujon ni ne povis akcepti kiel kongreslandon, ĉar ĉeestis neniu belgo por preni je si la grandegan laboron de kongrespreparado. Ni povis elekti do nur inter Nederlando kaj Germanujo.

Dum la lasta renkontiĝo de la nederlandaj TEJO-anoj la propono vekis grandan entuziasmon. Dume ni ricevis kelkajn leterojn el eksterlando, i.a. el Germanujo kaj Anglujo,

kaj niaj geamikoj aklamas la ideon organizi la IJK-n denove en Nederlando.

En la nederlanda TEJO-armeo oni nun febre laboras por kompili la L.O.K.-n. La provizora L.O.K. jam formiĝis kaj ni jam nun povas perfidi, ke la IJK okazos verŝajne en Hilversum aŭ ĝia tuja ĉirkaŭaĵo. Hilversum estas fama pri siaj radio-sendstacioj, vi trovas la nomon Hilversum sur ĉiuj radio-aparatoj. Oni eĉeĉ flustras, (ĉu prave?) ke dum la Internacia Balo - kiu nepre okazos - ludos iu radioorkestro.

La IJK okazos antaŭvideble unu semajnon antaŭ la UEA-kongreso, do ni certe povos bonvenigi multajn geamikojn kiuj vojaĝonte al Haarlem unue elvagoniĝos en Hilversum por viziti nian kunvenon internacian.

Atentu la sekvantan nron de LJV por la unuaj informoj de la L.O.K.

Uzu vian libro-servon, tiel subtenante la organizon.

PARENTEZE.

Kutimoj.

Antaŭ du jaroj ĉe mi gastloĝis samideano el tre malproksima lando. Tio ne estas io mirakla, sed jes mirakle estis, almenaŭ al mia dek-jara frateto, ke mia amiko manĝis per du bastonetoj anstataŭ per forko kaj kulero. La knabo devis tiom ridi pro tio, ke li eĉ kaŝis sin malantaŭ la kurteno. Vi komprenas la iomete malagrablan situacion en kiu mi troviĝis. Mi petis pardonon kaj klarigis, ke la infano neniam vidis iun tiel manĝanta. Nu, mia gasto ridetis kaj diris: 'Ne gravas, venontjare vi vizitu min kaj vi vidos, ke ĉe mi oni ridos pro via maniero de manĝado.'

Kaj la venantan jaron mi vojaĝis al la malproksima lando de mia amiko. Mi kunportis kuleron, forkon kaj tranĉilon, ĉar mi ne estis forgesinta la okazintaĵon dum la manĝado kaj mi volis esti certa, ke mi ne bezonas manĝi per bastonetoj.

La alveno en la hejmo de mia amiko estis treege kora. Memdire ankaŭ

venis la momento dum kiu ni devis manĝi. Ni altabliĝis kaj mi elpoŝigis mian manĝilaron. Kidec miu gastiganto rigardis kaj mire lia edzino kaj dekdujara filo rigardis. Subite la knabo nin forlasis kaj kuris eksteren kaj - baldaŭ grupo da junuloj kaj poste ankaŭ plenkreskuloj staris antaŭ la fenestro por vidi la spektaklon, kiun mi kaŭzis per mia manĝilaro. La aro da homoj tiom kreskis, ke eĉ la trafiko estis stagnata kaj mia amiko tial telefonis la policon. Du policanoj venis por disirigi la homojn kaj poste ambaŭ eniris la domon. Nepre mi devis montri mian pasporton kaj anstataŭ foriri, ili restis ĝis ni finmanĝis, scivole alrigardante min senhalte!!!

Ne, tre bonguste mi ne manĝis, kaj mi esperas, ke nia lingvo baldaŭ venkos la mondon. Antaŭ tio mi ne reiros al la malproksima lando de mia amiko!



Ni renkontiĝos en Grésillon.

Inter Kristnasko kaj Novjaro Germana Esperanto-Junularo en kunlaboro kun francaj junaj geamikoj aranĝos internacian kulturpolitikan renkontiĝon en la Kulturcentro de Francaj Esperantistoj, Kastelo Grésillon. Riĉa programo de tiu kunveno indikas inter alie: referaĵon de Michel Schmidt, Konstanz, pri 'La socia stato de la hodiaŭa germana studentaro', referaĵon de Gerd Brinkmann, Herford, pri „La evoluo de la germana junular-movado”, referaĵon de Jeanne Dedieu, Toulouse, pri „La franc-germana kultura interŝanĝo de la mezepoko ĝis hodiaŭ”, diskutadojn pri diversaj aktualaj politikaj temoj, ekskursojn al la Loire-

kasteloj kaj al Monto St. Michel ĉe la Atlantika bordo, festvesperon internacian okaze de la jarfino ktp.

La kostoj por francaj kaj aliaj negermanaj partoprenantoj estas 750 frcs. po tago. Post la kunveno okazos dutaga restado en Parizo.

Gravan financan subtenon Germana Esperanto-Junularo ricevis de la Ministerio por Internaj Aferoj en Bonn kaj de la Franca Altkomisari-ejo por Germanio.

Interesuloj tuj petu detalan invitilon kun ĉiuj atendindaj informoj ĉe la Centro de Germana Esperanto-Junularo, Sandbrede 37, Herford, Germanio.

E-er.

Esperantista Junularkunveno en Italujo.

Dum la 25a kongreso de Itala Esperanto-Federacio, okazinta en Como de la 5a ĝis la 9a de septembro, vekis apartan intereson la kunsido de la Itala Esperantista Junularo, ĵus fondita sekcio de I.E.F. Dum la vigla kaj fruktodona diskuto evidentiĝis, ke la junularo reprezentas unuarangan faktoron en la itala esperantomovado. La kunsidantaro donis al f-ino Bianchi el Milano kaj al s-roj Broccatelli el Bologna, Capacchi el Parma, Fighiera el Torino kaj Minnaja el Roma la komision, redakti proponon prezentotan al la ĝenerala kunsido de la kongreso. Jen ĝi estas.

LA KVARA JUNULA KUNVENO, okazinta en Como la 6an de septembro 1953a, kiun partoprenis pli ol 30 junuloj el 7 urboj, laŭ la jena tagordo:

- 1e. Raporto pri la junula nacia situacio;
- 2e. Influo de la junula movado sur la renovigo de la itala esperantismo;
- 3e. Interrilatoj kun junulaj asocioj kaj entreprenoj en Italujo;
- 4e. Kontaktoj kun T.E.J.O.;
- 5e. Diversaĵoj.

Aŭdinte la raporton de la sekretario, s-ro Guglielmo Capacchi, ĝin

aprobas kaj konfirmas la nunan estraron, nome s-ron Capacchi el Parma, s-ron Codazza el Torino, s-ron Cosatti el Udine;

Invitas la kongreson aprobi la proponon laŭ kiu la tri estraranoj de I. E. J. fariĝu samrajtaj komitatanoj de la I.E.F.-estraro;

Decidas starigi interrilatojn kun la internaciaj junulaj Esperantomovadoj;

Konsiderinte, ke jam ekzistas aparta junula vivo en pluraj italaj centroj, ke la junula kontribuo al la movado jam estas unuaranga kaj havas plibonigan funkcion rilate al kultura kaj lingva niveloj de la grupoj;

Rekomendas, ke en la grupaj renkontejoj oni plivalorigu la esperantan konversacion kaj ĝenerale la disvastigadon de la esperantaj kulturo kaj literaturo;

Atentigas la kongreson, por ke ĝi eluzu ĉiujn rimedojn oferatajn de la junula movado.

Ĉi tiu propono estis unuvoĉe akceptata de la kongreso; tio montras, ke en Italujo la junula movado vere estas grava kaj ke ĝi estas favore rigardata de la ne plu junaj Esperantistoj.

Nicola Minnaja.

Ĉu nia junularorganizo malprogresas?

Ĝenerale ni povas konstati, ke la junuloj ne estas tiom aktivaj, kiom ili devus esti. Multaj, tre multaj komencas kaj finas la esp. kurson, sed poste ili restas pasivaj, laboras aŭ ne laboras kaj fine forgesas, kion ili eklernis. Nur tre malgranda procento da ili restas vere aktiva. Se ni tiel laboros, ni neniam sukcesos.

Sed kio estas la kaŭzo de tiu mal-

intereso por la kunlaboro? Mi opinias, ke la plej granda kaŭzo situas en la manko de interesaĵoj, t.e. libroj, gazetoj, studmaterialo, ktp.

La dua kaŭzo estas ke al ni mankas bonaj, energiaj gvidantoj kaj iniciatantoj, kiuj vekus nian nefortan, nestabilan junularon kaj interresigus ĝin por io ajn.

Preskaŭ en ĉiu lando la poŝt-
daŭrigo sur p. 21

**KASRAPORTO DE TUTMONDA ESPERANTO
JUNULAR ORGANIZO**

1952—1953.

Enspezoj.

Saldo je 7-8-1952 f 868.84

Kotizoj kaj abonoj

Ned-aj f 675.95

„De Esperantist” ” 12.25

Anglaj ” 264.12

Svisaj ” 19.12

Aŭstriaĵ ” 36.64

Aŭstraliaĵ ” 5.67

Kanadaĵ ” 7.59

Norvegaĵ ” 2.50

Svedaĵ ” 10.14

Hungaraĵ ” 3.—

Braziliaĵ ” 4.—

Ĉeĥoslovakaj ” 3.—

f 1043.98

Diversaĵoj

Anoncoj f 2.75

Donacoj ” 0.50

Resp. Kuponoj ” 5.80

Libro Servo ” 0.83

Aliaĵ ” 0.50

Profito RY ” 117.45

Kongr. kot. Kanter ” 10.—

Profito WÖRGL parta ” 20.36

Kongr. kot. Burgler ” 5.—

P.M. el ĝiro ” 50.—

Prunto de G. de Vries ” 24.44

f 237.63

f 2150.45

Elspezoj

Eldonaĵoj

Preskostoĵ LJV f 1100.95

Ekspedkostoĵ LJV ” 139.22

Slipoĵ por LJV ” 55.—

Aliaĵ (i.a. LPilP) ” 23.60

f 1318.77

Diversaĵoj

Afranko Prez./Sek. ” 75.71

Afranko Kas./Adm. ” 36.99

Afranko Red. ” 26.58

Papero por D.G.S. ” 3.22

Vojaĝkostoĵ Estraro ” 35.13

Oficejaĵoj ” 94.01

Papero por L.S. ” 118.25

Invitoĵ por WÖRGL ” 58.50

P.M. al kaso ” 50.—

Ned.-a Sekcio (ŝuldo) ” 79.08

f 577.47

Saldo je 1-9-1953 f 254.21

f 254.21

f 2150.45

Leeuwarden, Oktobro 1953-a,
La kasisto: G. DE VRIES.
La Kaskontrolakomisiono:

H. WESTRA.
H. BRINKMAN.

BILANCO JE 1-9-'53.

Bonhavoj.

Malnova ŝuldo de Ned. Sekcio	f 80.01
Eksterlandaj kotizoj	„ 700.—
Stoko Libro Servo	„ 400.—
Pro I.J.K. WöRGL	„ 50.—
Diversaj malgrandaj bonhavoj	„ 7.35
Saldo de kaso	„ 254.21
	f 1491.57
	f 1491.57

Ŝuldoj.

Al Ned.-a Sekcio (i.a. 10 %)	f 149.76
Al Muusses (eldonisto LJV)	„ 712.75
Al S-ino Burgler	„ 4.61
Al Libro Servo	„ 32.29
Al U.E.A.	„ 12.—
Al G. de Vries	„ 24.44
Duba mono en Eksterlando	„ 300.—
SALDO	„ 255.72
	f 1491.57
	f 1491.57

BUDGETO 1953-1954.

Enspezoj.

Kotizoj 700 p. po g. 3.—	f 2100.—
150 p. po g. 2.—	„ 300.—
Profito Libro Servo	„ 50.—
Profito I.J.K.	„ 150.—
	f 2600.—
	f 2600.—

Elspezoj.

Preskostoj L.J.V.	f 1850.—
Ekspedkostoj L.J.V.	„ 220.—
Slipoj por L.J.V.	„ 50.—
Kostoj Estraro (afranko, vojaĝoj, Servoj)	„ 200.—
Oficejaĵoj	„ 40.—
10 % al Landaj Sekcioj	„ 240.—
	f 2600.—
	f 2600.—

KLARIGOJ:

Kasraporto:

Ne estas eble raporti akurate de 7-8-'52 ĝis 1-9-'53, ĉar ĉiam ekzistas malnovaj en- kaj elspezoj (bonhavoĵ kaj ŝuldoj). Montriĝis ne ebla enkasigi ĉiujn eksterlandajn kotizojn pro ne sufiĉa kontakto inter la perantoj kaj la kasisto/administranto kaj pro la limigita tempo mia.

Aldonu al la profito de I.J.K. RY g. 94.36, kio jam estis en la kaso ('51-'52).

Bilanco:

Montriĝas ankaŭ ke la kasisto ne povas disponi je la precizaj faktoj, necesaj por la bilanco. Kaŭzo: malbona kontakto kun perantoj.

Pro tio mi taksis la bonhavoĵn iomete malalta; la duba mono estas la ankoraŭ ne enkasita mono el Brazilo.

Budĝeto:

Espereble ni nun sukcesos varbi novajn membrojn pere de nia In-

forma Fakoj; mi jam kalkulis je gajno de 100 personoj! (tio signifas g. 300!!!). L.J.V. dum ankoraŭ unu jaro povas aperigi en sia nuna bona kaj bela „vesto”, sed se ni ne sukcesos varbi novajn membrojn, ni devos plisimpligi nian L.J.V.

Generale, mi ripetas, la kontakto kun la perantoj ne estis sufiĉa; espereble tio pliboniĝos. Mi dankas tiujn kiuj regule sendis la raportoĵn, pro la farita laboro. Plue dankon al ĉiuj, kun kiuj mi kunlaboris; jes, efektive kunlaboris, ĉar mi ne denove povas min disponigi por TEJO. Bedaŭrinde ĉar mi volonte volus kaj estas ankoraŭ multa laboro. Pro tio mi esperas ke la nova estraro sukcesos trovi la necesajn aktivajn personojn kaj ke la membroj mem propagandos nian organizon por ke ĝi kresku kaj kresku!

Samideane via,

GEERT DE VRIES.

Leeuwarden, 11 Okt.o 1953-a.

KASKONTROLA RAPORTO.

Subskribintoj kontrolis kaj trovis la kaslibrojn (de 7-8-52 ĝis 1-9-53) en bona ordo.

Same kiel dum la antaŭa jaro, ili opinias la faritan laboron de la kasisto/administranto profitdona por la TUTMONDA ESPERANTO-JUNULAR-ORGANIZO.

Leeuwarden (Ned-o),
la 11-an de oktobro, 1953-a
La Kaskontrolakomisiono:

Henk Westra,
Henk Brinkman.

„Nord Eclair” kaj TEJO.

La franca jurnalo „Nord-Eclair” publikigis ampleksan artikolon pri la IJK en Wörgl.

Grava Nordfranca gazeto „Nord-Eclair” regule aperigas Esperanto-informojn en la kadro de sia dimanĉa junulara paĝo.

Redaktoro. Lucien GILOTEAUX, TEJO ano, 28 rue des Jardins, CROIX (Nord) FRANCUJO.

Ostrava Junularo aranĝas 17.12.53 „Letervesperon” por ligi kontakton kun kluboj el tuta mondo. Ni ŝatus interŝanĝadi spertojn pri kunvenaj programoj kaj pri gvidado de kursoj. Rekompence al ĉiuj skribintoj ni sendos propagandmaterialon pri nia patrujo.

Skribu al: Libuše Bohanusová, Ostrava I, Prívotzská 23, Ĉeĥoslovakio.

PERANTOJ KAJ KOTIZOJ DE T.E.J.O.

Aŭstralio:	Fr. Halls, 59 Nepean Highway, Elsternwick S 4. Melbourne	ŝ.	Asp. 5.—	Akt.-Subt. ŝ.	7.—
Aŭstrujo:	Alois Hilkersberger, Landeck, Lötzweg 1. Tirol; poŝtspark. 195356	ŝ.	14.—	ŝ.	20.—
Belgujo:	Ph. Cullus, 13. rue Chopin, An- derlecht—Bruxelles; ĝironro 806765	fr.	27.—	fr.	40.—
Brazilo:		Cr \$	10.—	Cr \$	15.—
Britujo:	F-ino N. Rees, Derwydd, Seven Sisters, Nr. Neath, S. Wales Por org. af.: S-ro B. O. Sullivan, 15 Ho- mestead Close Shiregreen, Sheffield.	ŝ.	4.—	ŝ.	6.—
Danujo:	Kaj Pedersen, Brønshøjvej 62, Brønshøj, ĝironro 73478 ...	Kr.	4.—	Kr.	6.—
Finnujo:	Eld. Vilho Setälä, Onentie 23 Helsinki-kä	Fmk.	175.—	Fmk.	265.—
Francujo:	Dan. Luez, Lycée, Laon (Ais- ne)	Fr.	190.—	Fr.	280.—
Germanujo:	Rolf Brune, (21b) Dortmund, Märkischestr. 184	Dm.	2.25	Dm.	3.50
Hispanujo:	M. Montserrat, Strato Proven- za 75, Barcelona	Pes.	20.—	Pes.	30.—
Italujo:	Prof. A. Camuffo, 4. Bárt. d'Alviano, Trieste 420	L.	335.—	L.	500.—
Jugoslavujo:	Kralj Drago, Rozna Dolina 6-22, Ljubljana	Din.	27.—	Din.	40.—
Maroko:	Ben Sion Ohana, Rue de la Kashba I. Marrakech, ĝiro- nro Rabat c/ c. 368.92	Fr.	190.—	Fr.	280.—
Nederlando:	Kasisto vakas, ĝironro 537168 Peranto: Koos Kranenburg, Steenschuurweg 10, Leiden	f	2.—	f	3.—
Norvegujo:	Eldonejo Esperanto A. E. Boks 942. Oslo	Kr.	4.—	Kr.	6.—
Polujo:	Benedict Palczinsky, Reda k. Gdynia	Zly	2.10	Zly	3.20
Svedujo:	Esperanto-Förlagsföreningeņ, Box 19071, Stockholm 19 ...	Kr.	2.75	Kr.	4.10
Svisujo:	Sro R. Keller, Kleinalbis 59, Zürich 45	Fr.	2.30	Fr.	3.45
Usono:	E.A.N.A. 114. West 16th. Str. New York 11. N.Y.	\$	0.60	\$	1.—

Familianoj povas pagi duonan kotizon.

ORGANIZAJ INFORMOJ:

Ni kore gratulas nian prezidanton Tammo Kanter kaj f-inon Siets Noordhoff el Leeuwardeno pro ilia gefianĉiĝo. Ni deziras al la novbakita fianĉo almenaŭ la saman laboremon, kian li montris antaŭ la fianĉiĝo kaj al la fianĉino ni deziras multege da kompreno por nia afero kaj sufiĉe da toleremo, ke ŝi povu la fianĉon malhavi dum la tempo, kiam li devas labori aŭ konferenci por TEJO. Cetere ni deziras al ambaŭ multe da feliĉo.

De s-ro Donald R. Broadribb, Rochester ricevis la redakcio leteron, per kiu li petas ĝustigon de la artikolo, aperinta en LJV n-ro 10/1952, pri la kontrakto inter TEJO kaj EANA-Junulargrupiĝo. Tuj post la ricevo de la respondo de s-ro M. Frense, de kiu la sekretariejo de TEJO la informojn ricevis, ni aperigos la ĝustigan artikolon.

La G(ermana) E(speranto) J(unularo) intencas okazigi dum la Paskotagoj en 1954, en Berlino kunvenon kune kun la Orientanoj.

Nun ili organizas monkolektadon por povi sendi pakajetojn okaze de la Kristnaskfestoj al la Orientaj Geamikoj. Ni gratulas al ĉi bela iniciato.

En Kerkrade, Nederlando, okazos en 1954. Muzikolimpiado. En 1951, partoprenis pli ol 5000 muzikistoj. Se vi interesiĝas aŭ povas interesiĝi muzikistojn, petu informojn en Esp. de la Organiza Komitato Muzikolimpiado, Gemeentehuis, Kerkrade (Limburg) Nederlando.

En Hago okazis antaŭ nelonge Eŭropa-tago, Gejunuloj el preskaŭ tuta Eŭropo partoprenis. La Juna-n Vivo-n reprezentis s-ro Koos Kranenburg. En nia sekvanta n-ro vi povos legi lian raporton. El la francaj TEJO-anoj partoprenis S-ro L. Giloteaux.

NI MENCIAS ... NI RECENZAS ...

Slosilo por 12 lingvoj: 96 paĝoj, formato 7 × 20 cm kun 4 kolora, lakita kartonkovrilo. Mendebla ĉe Vilho Setälä, Helsinki-Taivaskallio, Finnlando. Prezo 9 ŝil. aŭ egalvaloro.

Plej necesaj, sisteme ordigitaj vortoj sur same numerigitaj linioj en finna, sveda, dana, norvega, angla, germana, franca, rusa, Esperanto, itala, hispana kaj portugala lingvoj.

Dr Osada Arata: Infanoj de l'atombombo. Knaboj kaj knabinoj, postvivintaj la timegigan atombombon de Hiroŝima priskribas siajn spertojn dum la kritika tago. Terura travivaĵo por senkulpaĵ infanoj. Ĉiu milito estas kruela kaj malŝatinda. Neniam plu militon!

La libreto estas mendebla ĉe Nakakio-ku, Kaniĵa librejo, KIOTO, Japanujo. Prezo 0.4 us. dol. aŭ 6 resp. kup. (inkl. sendkostojn) aŭ egalvaloraj Esp. libroj (sed ne gazetoj).

Studenta Vivo en Japanio: Superrigardo pri la vivo de la japanujaj studentoj, eldonita de la Esp. grupo en Kioto-Universitato Sakio-ku, Kioto, Japanujo.

En unu el niaj sekvantaj nroj ni klopodos publiki iun ĉapitron el ĉi broŝurita kajero por doni al niaj anoj impreson, kiel vivas kaj pensas la studentoj en Oriento.

La Sankta Skribo de Amo: tradukita de Kotohiko Macubara. Havebla kontraŭ 2 resp. kup. ĉe la tradukinto, Tenmori, kozoĵi Higaŝikasugai, Aiĉiken, Japanujo.

Wilh. und Hans Wingen: Post la kurso, perfektiga libro de Esperanto. Eldonis: Der Limburger Vereinsdruckerei, Limburg/Lahn, Germ. Lingve aprobitade la Lingva Sekcio de GEA. Prezo gm. 3.60 + 10 % afr. Ĝi celas pli perfektigi la kursistojn; la enhavo estas sprita kaj varia. Kun germanlingvaj klarigoj.

A. B. Krempel: *Letero el Transcendo*. Eldonis: Limburger Vereinsdruck. G.m.b.H. Limburg, Germ. Tradukis el la germ. lingvo M. M. Mielert, kun Eklezia presperm. de la episkopa oficejo. Prezo gm. 1.20 + 10 % afr. Kvan-kam ni preferas uzi vortojn, kiuj estas ankaŭ por malpli instruituloj ĝenerale konataj (transcendo = alia mondo) la libreto estas facile legebla. Ĝi pritraktas, ke juna monahino en sonĝo legas leteron de ĵus akcidenti-ĝinta amikino, kiun ŝi lasta sendis al ŝi el la infero. Tra la tuta libreto sentiĝas: „kiu ne preĝas, venas en la inferon.” Estas nur bagatelaj pres-eraretoj.

Rui Barbosa (1849—1923) de Fernando Nery, biografia eseo. Tradukis el la portugala lingvo Jozefo Joels. Eldonis Domo de Rui Barbosa, Rua Sao Clemente 134. Rio de Janeiro, Brazilo, 293, p. kun 10 tutpaĝaj fotorepro-duktaĵoj. Ĉi tiu impona libro, presita sur bonega papero estas *senpaga* por ĉiu Esperantisto. Interesuloj petu ekzempleron pri la vivo de Rui Barbosa, unu el la plej historiaj figuroj, el Brazilo, kaj montru al la brazila regi-staro, ke ĝi ne vane publikigis ĉi tiun bonegan verkon. (Ĉi sciigon ni trans-prenis el la New Zealand Esperantist. Espereble la redakcion baldaŭ atin-gos la petita ekzemplero).

Ĉu vi volas scii, kiom da registritaj Esp. Organizoj ekzistas? Ĉu vi volas scii la nomon de iliaj estraroj, revuoj, ktp? Vi povas ĝin legi en la Ia parto de la Jarlibro de UEA. Ĝin ricevas nur membroj, neaĉetebla.

daŭrigo de paĝo 15.

afranko pligrandiĝis kaj tial la ko-respondado estas limita. Ĉu ne eblus atingi, ke la esperantistoj ricevu ian rabaton je la korespondado?

Same estas kun la valutoj. Tre facile estas ekzemple aboni ian fremdan esp. gazeton en Jugoslav-ujo, krome Heroldon kaj Praktikon. (Red. noto: La skribinto verŝajne opinias: *malfacile*). Kelkaj niaj ge-studentoj tre dezirus ricevi LJV. Tre malofte oni povas aĉeti ian esp. libron. Ni havas nek respondkupo-nojn, nek la dinaron ni povas ŝanĝi pro manko de valutoj.

La tria kaŭzo estas denove la fi-nancoj. En Jugoslavujo la plej gran-da parto de esp. gejunuloj estas ler-nantoj, aŭ studentoj. Kaj vi ja scias, ke „studento estas homo, kiu ne ha-vas monon” tial li (aŭ ŝi) ankaŭ ne povas aboni ion, aŭ iri al mondkon-greso aŭ internacia junulartendaro, eĉ se li havas la volon.

Ĉi tiuj estas la ĉefaj kaŭzoj, ke la junularo ne estas tiel aktiva, fiera kaj kial ni ne atingas tiujn sukce-

sojn, kiujn ni devus. Ni devas trovi manieron, kiel ni interesigu la ju-nularon, ke vere ĉiu junul(in)o res-tu en la organizo kaj laboru en ĝi.

Mi opinias, ke tio necesas ne nur ĉe ni, sed ankaŭ en aliaj landoj, ĉar la situacio estas preskaŭ ĉie la sa-ma.

Tial estas tre bonvena la laboro, priskribita en la rubriko „Labore-mo” en la maja kaj junia numeroj de „La Juna Vivo”.

Ravne na Koroškom, la 5an de julio 1953a.

Božić Janko.

Noto de la redakcio: Ni tre vo-lonte atendas reakcion pri ĉi tiu ar-tikolo ankaŭ el aliaj landoj. Kom-preneble TEJO ne povas disponigi multajn nrojn de LJV por sendi ilin al la „nepagipovaj” geamikoj, tial ni ree petas vian helpon. Petu adre-sojn de la sekretario de TEJO kaj helpu niajn geamikojn per senda-do de la legitaj LJV. Aŭ donacu iom ĉi cele.

ORGANIZAJ INFORMOJ:

Ni kore gratulas nian prezidanton Tammo Kanter kaj f-inon Siets Noordhoff el Leeuwardeno pro ilia gefianĉigo. Ni deziras al la novbakita fianĉo almenaŭ la saman laboremon, kian li montris antaŭ la fianĉigo kaj al la fianĉino ni deziras multege da kompreno por nia afero kaj sufiĉe da toleremo, ke ŝi povu la fianĉon malhavi dum la tempo, kiam li devas labori aŭ konferenci por TEJO. Cetere ni deziras al ambaŭ multe da feliĉo.

De s-ro Donald R. Broadribb, Rochester ricevis la redakcio leteron, per kiu li petas ĝustigon de la artikolo, aperinta en LJV n-ro 10/1952, pri la kontrakto inter TEJO kaj EANA-Junulargrupiĝo. Tuj post la ricevo de la respondo de s-ro M. Frense, de kiu la sekretario de TEJO la informojn ricevis, ni aperigos la ĝustigan artikolon.

La G(ermana) E(speranto) J(unularo) intencas okazigi dum la Paskotagoj en 1954, en Berlino kunvenon kune kun la Orientanoj.

Nun ili organizas monokolektadon por povi sendi pakajetojn okaze de la Kristnaskfestoj al la Orientaj Geamikoj. Ni gratulas al ĉi bela iniciato.

En Kerkrade, Nederlando, okazos en 1954. Muzikolimpiado. En 1951, partoprenis pli ol 5000 muzikistoj. Se vi interesiĝas aŭ povas interesi muzikistojn, petu informojn en Esp. de la Organiza Komitato Muzikolimpiado, Gemeentehuis, Kerkrade (Limburg) Nederlando.

En Hago okazis antaŭ nelonge Eŭropa-tago, Gejunuloj el preskaŭ tuta Eŭropo partoprenis. La Juna-n Vivo-n reprezentis s-ro Koos Kranenburg. En nia sekvanta n-ro vi povos legi lian raporton. El la francaj TEJO-anoj partoprenis S-ro L. Giloteaux.

NI MENCIAS . . . NI RECENZAS ...

Slosilo por 12 lingvoj: 96 paĝoj, formato 7 × 20 cm kun 4 kolora, lakita kartonkovrilo. Mendebila ĉe Vilho Setälä, Helsinki-Taivaskallio, Finnlando. Prezo 9 ŝil. aŭ egalvaloro.

Plej necesaj, sisteme ordigitaj vortoj sur same numerigitaj linioj en finna, sveda, dana, norvega, angla, germana, franca, rusa, Esperanto, itala, hispana kaj portugala lingvoj.

Dr Osada Arata: Infanoj de l'atombombo. Knaboj kaj knabinoj, postvivintaj la timegigan atombombon de Hiroŝima priskribas siajn spertojn dum la kritika tago. Terura travivaĵo por senkulpaĵ infanoj. Ĉiu milito estas kruela kaj malŝatinda. Neniam plu militon!

La libreto estas mendebila ĉe Nakakio-ku, Kanija librejo, KIOTO, Japanujo. Prezo 0.4 us. dol. aŭ 6 resp. kup. (inkl. sendkoston) aŭ egalvaloraĵ Esp. libroj (sed ne gazetoj).

Studenta Vivo en Japanio: Superrigardo pri la vivo de la japanujaj studentoj, eldonita de la Esp. grupo en Kioto-Universitato Sakio-ku, Kioto, Japanujo.

En unu el niaj sekvantaj nroj ni klopodos publiki iun ĉapitron el ĉi broŝurita kajero por doni al niaj anoj impreson, kiel vivas kaj pensas la studentoj en Oriento.

La Sankta Skribo de Amo: tradukita de Kotohiko Macubara. Havebla kontraŭ 2 resp. kup. ĉe la tradukinto, Tenmori, kozoĵi Higaŝikasugai, Aiĉiken, Japanujo.

Wilh. und Hans Wingen: Post la kurso, perfektiga libro de Esperanto. Eldonis: Der Limburger Vereinsdruckerei, Limburg/Lahn, Germ. Lingve aprobite la Lingva Sekcio de GEA. Prezo gm. 3.60 + 10 % afr. Ĝi celas pli perfektigi la kursistojn; la enhavo estas sprita kaj varia. Kun germanlingvaj klarigoj.

A. B. Krempel: *Letero el Transcendo*. Eldonis: Limburger Vereinsdruck. G.m.b.H. Limburg, Germ. Tradukis el la germ. lingvo M. M. Mielert, kun Eklezia presperm. de la episkopa oficejo. Prezo gm. 1.20 + 10 % afr. Kvan-kam ni preferas uzi vortojn, kiuj estas ankaŭ por malpli instruituloj ĝenerale konataj (transcendo = alia mondo) la libreto estas facile legebla. Ĝi pritraktas, ke juna monaĥino en sonĝo legas leteron de ĵus akcidentiĝinta amikino, kiun ŝi lasta sendis al ŝi el la infero. Tra la tuta libreto sentiĝas: „kiu ne preĝas, venas en la inferon.” Estas nur bagatelaj pres-eraretoj.

Rui Barbosa (1849—1923) de Fernando Nery, biografia eseo. Tradukis el la portugala lingvo Jozefo Joels. Eldonis Domo de Rui Barbosa, Rua Sao Clemente 134. Rio de Janeiro, Brazilo, 293, p. kun 10 tutpaĝaj fotoreproduktaĵoj. Ĉi tiu impona libro, presita sur bonega papero estas *senpaga* por ĉiu Esperantisto. Interesuloj petu ekzempleron pri la vivo de Rui Barbosa, unu el la plej historiaj figuroj, el Brazilo, kaj montru al la brazila registaro, ke ĝi ne vane publikigis ĉi tiun bonegan verkon. (Ĉi sciigon ni transprenis el la New Zealand Esperantist. Espereble la redakcion baldaŭ atingos la petita ekzemplero).

Ĉu vi volas scii, kiom da registritaj Esp. Organizoj ekzistas? Ĉu vi volas scii la nomon de iliaj estraroj, revuoj, ktp? Vi povas ĝin legi en la Ia parto de la Jarlibro de UEA. Ĝin ricevas nur membroj, neaĉetebla.

daŭrigo de paĝo 15.

afranko pligrandiĝis kaj tial la korespondado estas limita. Ĉu ne eblus atingi, ke la esperantistoj ricevu ian rabaton je la korespondado?

Same estas kun la valutoj. Tre facile estas ekzemple aboni ian fremdan esp. gazeton en Jugoslavujo, krome Heroldon kaj Praktikon. (Red. noto: La skribinto verŝajne opinias: *malfacile*). Kelkaj niaj gestudentoj tre dezirus ricevi LJV. Tre malofte oni povas aĉeti ian esp. libron. Ni havas nek respondkuponojn, nek la dinaron ni povas ŝanĝi pro manko de valutoj.

La tria kaŭzo estas denove la financoj. En Jugoslavujo la plej granda parto de esp. gejunuloj estas lernantoj, aŭ studentoj. Kaj vi ja scias, ke „studento estas homo, kiu ne havas monon” tial li (aŭ ŝi) ankaŭ ne povas aboni ion, aŭ iri al mondkongreso aŭ internacia junulartendaro, eĉ se li havas la volon.

Ĉi tiuj estas la ĉefaj kaŭzoj, ke la junularo ne estas tiel aktiva, fiera kaj kial ni ne atingas tiujn sukce-

sojn, kiujn ni devus. Ni devas trovi manieron, kiel ni interesigu la junularon, ke vere ĉiu junul(in)o restu en la organizo kaj laboru en ĝi.

Mi opinias, ke tio necesas ne nur ĉe ni, sed ankaŭ en aliaj landoj, ĉar la situacio estas preskaŭ ĉie la sama.

Tial estas tre bonvena la laboro, priskribita en la rubriko „Laborem” en la maja kaj junia numeroj de „La Juna Vivo”.

Ravne na Koroŝkom, la 5an de julio 1953a.

Bozić Janko.

Noto de la redakcio: Ni tre volonte atendas reakcion pri ĉi tiu artikolo ankaŭ el aliaj landoj. Kompreneble TEJO ne povas disponigi multajn nrojn de LJV por sendi ilin al la „nepagipovaj” geamikoj, tial ni ree petas vian helpon. Petu adresojn de la sekretario de TEJO kaj helpu niajn geamikojn per sendado de la legitaj LJV. Aŭ donacu iom ĉi cele.

„Kaj kion mi devos aĉeti por vi?” demandis la komercisto.

„Ne gravas”, respondis la knabo. „Vi povas aĉeti kion ajn.”

La mastro promesis fari tion kaj forveturis per ŝipo.

En malproksimaj havenoj li aĉetis kion la servistoj mendis. Li jam estis sur la ŝipo, kiam li rememoris, ke li nenion aĉetis por la malriĉa knabo. Jam estis malfrue reiri en la urbon. Tiam li vidis virinaĉon, kiu portis katon por dronigi.

„Vendu vian katon por unu ŝilingo al mi”, li petis.

„Jes, jes” grakis la maljunulino. Kaj ŝi malaperis rapide. Ŝi timis, ke la komercisto redonos al ŝi la katon.

En iu haveno la komercisto eniris kafejon. Sur ĉiu tablo estis vipo. Li ne komprenis la aferon. Sed kiam la servisto venis kun la manĝaĵoj, li komprenis. En la kafejo vivis miloj kaj miloj da grandaj brunaj musoj. Oni devis ilin per la vipo peli de la tablo.

„Ĉu vi ne havas katon?” demandis la komercisto al la estro de la kafejo.

„Katon?” ripetis la estro. „Kio estas kato?”

La komercisto iris al la ŝipo kaj alportis la katon. La kato ĉasis la musojn al iliaj truoj.

„Estas mirinde!” ekkriis ĉiuj. „Ĉu vi vendos vian katon al ni?”

La komercisto vendis la katon por ses-cent pundoj. La estro de la kafejo tre ĝojis, ĉar ne plu estis musoj sur la tabloj.

La komercisto estis tre honesta. Kiam li hejmenvenis, li donis la ses-cent pundojn al la knabo. La knabo diris:

„Dankon, sinjoro! Vere, ĝi estis honesta ŝilingo, kiun mi donis al vi.”

Kaj li reiris al la patrino kaj ili vivis feliĉe.

La lerta ĉasisto.

Ĉasisto jam ofte ĉasis. Li ĉiam revenis kun malplena sako. Iam li tre frue foriris kaj malfrue revenis hejmen. Sur la vojo li renkontis knabeton. Li tenis kuniklon en la mano.

Ha, la ĉasisto pensis, nun mi revenos kun ĉasaĵo en mia ĉassako.

Li aĉetis la kuniklon, ligis ĝin per ŝnuro sur arbon kaj iris kelkajn paŝojn malantaŭen. Li pafis, sed je lia granda miro la kuniklo rapide forkuris. La kuglo tratranĉis la ŝnuron.

